

KOMENCANTO

gazeto por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj



Snejana Kononova [N.OMKA, Ruslando]

2001

kiel prezidanto de UEA Kep Enderby iĝis esperantisto
literatur-historiaj paĝoj — Valentena festo
vilaĝaj aventuroj — aforismoj — distraĵoj — anekdotoj
anoncetoj — abonu KOMENCANTOn por 2001 !

1

Perantoj de KOMENCANTO

ĉe tiuj adresoj vi povas aboni nian gazeton

Argentino Argentina Esperanto-Ligo, Casilla de Correo 2910 - Correo Central, AR-1000 Buenos Aires.

Aŭstralio Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016

Belgio Flandra Esperanto Ligo Frankrijklei 140, BE-2000, Antwerpen

Brazilo Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 03625, Brasilia (DF) - BR - 70084-970

Britio Esperanto-Asocio de Britio, 201 Felixstowe Road, Ipswich, IP3 9BJ

Ĉeĥio Vladislav Hasala, A.Dvoráka 1, CZ-696 62 Strážnice

Danio Revuservo de Dana Esperanto-Asocio Frederik Eriksen, Finsensgade 10, DK-4800, Nykobing F.

Estonio Virve Ernits, Mahla 65 — 1, EE — 0012, Tallinn

Finnlando Heta Kesälä, Kalamiehenkuja 3 D 32, FI-04300, Tuusula

Francio ~ Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004, Paris.

~ R.Melo, 34, Av. de Russie, FR-03700, Bellerive S/A

Germanio Dr. Wolfgang Schwanzner, Pfarrer-Seeger-Strasse, 9 D-55129 Mainz.

Irano Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, TEHRAN

Italio Itala Esperanto Federacio, Via Villorosi, 38, 20143, Milano.

Italio, Kroatio, Slovenio

Višnja Brankovič, Via Leghissa 6, IT-34131 Trieste

Katalunio Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 290, ES-08200, Sabadell

Kubo Lazaro Azcuy Ravelo, str. 25 #5611 c/56460 Playa 11300, HAVANO

Litovio Litova Esperanto-Asocio, LT-3000, Kaunas, ab.k. 167.

Norvegio Norvega Esperantista Ligo, Olaf Schous vei 18, N-0572 OSLO

Pollando Maciej Wnuk, Skrytka 105, ul. Broniewskiego 77-137, PL-01-865 Warszawa

Svedio SEF, Lisbet Andréasson, Södra Rörum pl 455, SE — 24294 Hörby

Svislando Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH — 4224 Nenzlingen

Usono

Esperanto Ligo por Norda Ameriko, P.O.Box 1129, El Cerrito, California 94530, U.S.A.

redakcie

Karaj legantoj!

Per tiu ĉi kajero nia revuo startas en la trian jarmilon. Ekde tiu momento ni komencas realigi la ideon rakonti al vi, kiel niaj eminentaj esperantistoj siatempe iĝis "komencantoj". Nia revuo havas honorigan eblecon ĉi-foje prezenti al vi rakonton de nuna prezidanto de Universala Esperanto Asocio *Kep Enderby* pri lia esperantistiĝo.

Pludaŭras nia ĉefa temo "Esperanta literaturo en historia aspekto", hodiaŭ ni prilumas la periodon de la Unua mondmiliĝo.

Sufiĉe granda spaco de ĉi-numero estas dediĉita al la *Valentena tago* kaj ni gratulas vin okaze de la festo de ĉiuj amantoj!

Sur la sekvaj paĝoj vin atendas distraj rakontoj el la vilaĝa vivo, tradiciaj aforismoj kaj anekdotoj, enigmoj kaj anoncetoj.. Kiel ĉiam abundas desegnaĵoj kaj bona humoro.

Agrablan legadon !

Viaj DONACOJ por KOMENCANTO estas ĉiam bonvenaj. DANKON !

KOMENCANTO

2001 numero 1 // 8 numeroj jare
regule aperas ekde 1997

redaktas kaj eldonas: Viktor Kudrjavcev
konstanta kunlaboranto: Rafija Jafasova
adreso:

620041, Ekaterinburg, ab. ja. 132, Ruslando
retpoŝto let@epost.uralpost.ru
abontarifo por 2001.

internacia tarifo: 13 eŭroj aŭ \$14;
orienteŭropa kaj latinamerika tarifo \$11;
aŭ por ĉiuj — 16 IRK

konto ĉe UEA. **vkud-a**

ruslanda tarifo: 88 рублей (за 8 номеров в год)
простым почтовым переводом на имя
Кудрявцева Виктора Васильевича:
620041, Екатеринбург, а. я. 132

Oni rajtas uzi bildojn kaj verkojn el "K"
La sola kondiĉo - nepre menci **KOMENCANTO**'n
kaj la nomojn de la aŭtoroj kun ties loglokojn.

Kiel tio komenciĝis

Kep Enderby, prezidanto de UEA

Vivu nia bela lingvo!

Karaj amikoj! Per tiu ĉi historio ni lanĉas serion de rakontoj de niaj eminentaj esperantistoj pri tio, kiel kaj kiam ili estis komencantoj. Ĉar ĉiuj el la gastoj de tiu paĝo loĝas en diversaj landoj kaj kontinentoj, kaj esperantiĝis en diversaj tempoj, la serio promesas esti vere interesa, kion pruvas rakonto de nia unua gasto Kep Enderby, Prezidanto de Universala Esperanto Asocio.



Por ĝuste kompreni kiel mi esperantiĝis oni devas fone sciigi iomete pri mia persona kaj profesia historio en Aŭstralio. La kialo ankaŭ ne sengraviĝas.

Mi naskiĝis en 1926 en Aŭstralia urbo kies nomo estas Dubbo. Mi havis onklon kiu loĝis en apuda urbeto Velingtono [Wellington], kiu situas proksimume 50 kilometrojn for de Dubbo. Mi neniam loĝis longtempe en Rusio sed mi povas imagi ke multaj foraj lokoj tie similas ĉe la tiamaj Dubbo kaj Velingtono.

Iam ĉirkaŭ 1937, mi sufiĉe bone memoras, ke mia familio vizitis mian onklon kaj sian familion en Velingtono kaj tie mi aŭskultis avide, dum mia onklo entusiasme pridiskutis Esperanton kun mia patro. Laŭ mia memoro, mia patro ne tiom interesiĝis pri Esperanto kiom mia onklo. Sekvo de tiu vizito, mi revenis al Dubbo kun kelkaj Esperanto-lernolibroj, pruntedonitaj al mi de mia onklo kaj komencis aŭtodidakte provi lerni Esperanton. Ne forgesu ke mi aĝis tiam, mi diru, nur 10 jarojn.

Mia tiama intereso en Esperanto ne daŭris longe, ĉar ĝi estis

anstataŭigita de pli pasiaj interesoj cele al sporto kaj la konstruo de maketaĵoj aviadiloj. Memoru, ke tiamaj Aŭstralianoj estis anoj de la tiama Brita Imperio kaj, pro tio, jam la dua mondmilito baldaŭ devigis ilian partoprenon en tiu milito.

Resume kaj mallonge, pro multaj kaŭzoj, kies detaloj ne gravas, mi ja tute forgesis kaj nek aŭdis, nek legis, la vorton "Esperanto" dum la venontaj 50 jaroj ĝis alproksimiĝis la fino de 1986.

Estis tiam ke mi ricevis telefonvokon de Ralph Harry, emerita Aŭstralia Ambasadoro, kiun mi jam renkontis dum antaŭa periodo kiam li laboris kiel Ambasadoro kaj mi kiel Ministro en la Aŭstralia Registaro.

Mi tiam estis juĝisto kaj Ralph diris, ke li estis prezidanto de la Aŭstralia Esperanto Asocio [AEA] kaj ke AEA intencis festi celebre la centdatrevenon de la eldono de la unua libro de Esperanto. Li demandis al mi, ĉu mi konis kie li povus kontakti mian antaŭan ĉefon en la registaro, eks-Ĉefministron de Aŭstralio, Gough Whitlam, ĉar li volis peti lin konsenti esti patrono de tiu ĉi festaĵo.

Estis tiu ĉi telefonvoko kiu re-nemorigis min pri Esperanto.

Dirite mallonge, tiu rememorigo gvidis min kontakti la lokajn Esperanto-grupojn en Sidnejo por eklerni Esperanton. Mi devas malkaŝe diri tute honeste, ke pro mia tiama aĝo de 62 jaroj, kaj pro la fakto ke mi ne posedis antaŭan bonan fremdlingvan sperton kaj probable mankis en mi bonaj fremdlingvaj talentoj, mi restis komencanto multe pli longe ol mi ŝatas

memori. Aliflanke, mi diru, ke estis pro la facileco kaj aparta allogo de Esperanto, ke malgraŭ tiaj malavantaĝoj, mi sukcesis progresigi min.

Plejparte mia progreso estis aŭtodidakta afero, kvankam kelkfojn mi partoprenis somerlernejojn, inkluzive la famajn Esperanto-trisemajnajn-somerkursarojn ĉe la Ŝtata Universitato de San Francisko kaj aliajn, kiuj okazis en Adelaido, Aŭstralio. Feliĉe kaj bonŝance mia edzino dividis mian intereson pri Esperanto kaj kunlaboris kun mi tra la jaroj de tia studado.

Ni partoprenis nian unuan UK en Havano, Kubo en 1990, kie ni aŭdis Fidel Kastro deklari ke li konsideris sin esti soldato por Esperanto. Jare de post tiam ni partoprenis UEA kongresojn konstante progresante.

Neniu povus imagi, sendube ne mia onklo en 1937, ke en 1992 mi prezidantiĝos de la Aŭstralia Esperanto Asocio [AEA] kaj ke en 1998 mi prezidantiĝos de UEA.

Viaj legantoj komprenu ke studado estas kaj devas esti vivdaŭra afero kaj kompare al aliaj Esperantistoj, mi dubas, laŭ aparta vidpunkto, ĉu mi iam ĉesos esti speco de komencanto. Tio ne ĝenas min ĉar por mi la malkovro de Esperanto malfermis kaj stimulis iujn el la plej ŝatataj periodoj de mia vivo. Vivu nia bela lingvo!

Kep Enderby
Prezidanto UEA

ESPERANTO kaj LITERATURO

La jaroj de la Unua mondmilito kaj esperanta literaturo

Karaj legantoj!

En la lasta kajero de pasintjara KOMENCANTO ni prezentis al vi la kreadon de eminenta E-verkisto Edmond Privat kaj kiel la citaĵo donis fragmenton de lia verko "Historio de la lingvo Esperanto". Nian unuan ĉi-jaran rakonton pri E-literaturo en historia aspekto ni ankaŭ decidis komenci de la citado el la sama verko de E.Privat, sed ĝi estas el la ĉapitro "Dum la milito" (1914-1917). Al ni saĝnas, ke la militpriskribo de E.Privat estas la plej trafa, profunda kaj taŭge respegalanta por vi povu imagi etoson de tiuj tagoj.

Edmond Privat

Historio de la lingvo Esperanto

Dum la milito (1914-1917)

Trimil sepcent esperantistoj enskribiĝis por la Deka Universala Kongreso en Parizo en 1914, inter ili 2500 eksterlandanoj... Karavanoj de Rusoj, Germanoj, Angloj jam forvojaĝis, kiam eksplodis la eŭropa milito. Alveninte en Parizon la 1-an de Aŭgusto, la fremdaj esperantistoj vidis ekscitajn popolamasojn, ĝeneralan mobilizon, ŝirajn adiaŭojn de patrinoj kaj edzinoj al forirantaj viroj. La karavanoj reprenis mem la vagonarojn en granda urĝo. Sed ne ĉiuj povis. Kelkaj malfeliĉaj fremduloj estis internitaj en civilkaptitejoj. La ceteraj haltiĝis survoje aŭ revenis hejmen, multaj por forveturi siavice al la batalkampoj.

D-ro Zamenhof, haltigita en Köln, rapidis al rusa landlimo, trovis ĝin fermita, reveturis Berlinon kaj devis entrepreni la longan vojaĝon tra Svedujo — Finnlando — Peterburgo por reatingi la hejmon en Varsovio. Sovaĝa kanonado kaj malamaj kantoj eksonis anstataŭ la espera himno. Diplomataj intrigoj kaj imperialistaj ambicioj ĵetis tutan Eŭropon en ĥaosan buĉadon. Malhela ondego dronigis la noblan revon de la esperantistoj sub fraĝasa ŝaŭmo.

Dum la milito, kompreneble, preskaŭ ĉesis la internacia literaturo vivo en Esperanto. Tamen estis kvankam malgrandaj vivsimpdomoj, neestingebla Esperantista fajro, kiu poste taŭgos por reŝanĝi la cindron en la resto de Esperantista mondo.

Kiel jam estis menciite, Grabowski dum tiu trista tempo, kvazaŭ por memkonsolo, pretigis sian ĉefverkon — la tradukon de "Sinjoro Tadeo" de Mickiewicz. Kaj Zamenhof ĝis sia morto (en 1917) ne ĉesis traduki "Malnovan Testamenton" kaj la "Fabelojn de Andersen" Ankaŭ pri unu grava verko de Zamenhof, skribita en tiu terura militempo, sed kiu kiel ĉiam ekhavis la esperon kaj la optimismajn revojn, bone skribis Marĵori Boulton:

"Sed karakteriza estis la lasta grava laboro en 1915, li (Zamenhof, *la red.*) iom riske, eldonis eksterlande sian artikolon "Post la Granda Milito - Alvoko al

la Diplomatoj" Tie li petegis la diplomatojn, ne nur modifi la mapon post la milito, sed celi la forigon de ĉiuj minoritataj problemoj kaj rasaj malamikecoj laŭ la principo "Ĉiu lando morale kaj materiale plene egalrajte apartenas al ĉiuj siaj filoj." La rimedo por atingi daŭran pacon estis forigi unu fojon por ĉiam la ĉefan kaŭzon de la militoj, la barbaran restaĵon el la plej antikva antaŭcivilizacia tempo, la regadon de unuj gentoj super aliaj gentoj."

Dum tiuj jaroj aperis ankoraŭ du rimarkindaj verkoj: "Doma Karesilo" (1917) - satira poemaro sub pseŭdonimo "Bela Manto" de Boris Mirski talenta poeto, kiu tradukis ankoraŭ el Lermontov; mem mortis dum la milito.

En 1915 publikigis la utopieca filozofi-socikritika romano "Nova Sento" de angla arkitektura desegnisto kaj pentristo Hyams H.G. (pseŭdonimo "Tagulo").

La romano de Hyams prezentas utopion de reformita socio. La animo de Londona senlaborulo, enkorpiĝas en la Marso kaj trovas tie feliĉan mondon, kiun la marsanoj konstruis baze de racia ekonomio kaj simpligita vivmaniero.

Ke la lingvo ne mortis, eĉ ne dormis konvinkas la fakto, ke dum la milito, kiam kruelaj cirkonstancoj disigis familiojn, geamikojn, Hector Hodler, la fondinto de UEA, kies sidejo tiam situis en terangulo, savita de l'milita ventego en neŭtrala Svislando, organizis servon por rekontaktigi disigitajn homojn. Lia organizo peris la transsendon de familiaj korespondaĵoj eĉ inter la militantaj landoj. Per sia gazeto

“Esperanto” Hodler memorigis al ĉiuj la homajn deĵojn: “La parolo estas nun al la kanono, sed ne eterne daŭros ĝia blekado... Se sur la nunaj ruinoj ni volas konstrui novan domon, oni bezonas laboristojn, kiujn ne timigos la malfacilaĵoj... Ni, esperantistoj, estu embrio de tiuj elitoj... ni konservu nian idealon...”

Dum la milito alia agadteritorio estis la militkaptitejoj, kie estis disdonitaj miloj da E-lernolibretoj inter diverslingvaj militkaptitoj. En multaj militkaptitejoj E-to iĝis ne nur nova okupo, sed ankaŭ alportis novan etoson. Jen kiel priskribis tion E. Privat:

“Tiaj malfeliĉaj junuloj, enfermitaj kiel brutaro inter bariloj, sopiris je la interesa allogaĝo, kiu forgesigas malsaton kaj hejmosopiron... En tiaj malliberejoj unu sola kaptito instruis la lingvon al centoj da ceteraj, kiuj kopiis vortojn kaj regulojn unuj de la aliaj. Tio, interalie, okazis en Siberio, kie japanaj generaloj eĉ subtenis tiun lernadon. Esperantistaj rondoj fondiĝis. Oni kantis la himnon kaj gaje interparolis la lingvon inter plej diversgentanoj. En tia perdita malproksima loko, la hungara poeto Julio Baghy verkis iujn el siaj plej belaj poemoj.”

Jes, Julio Baghy, nia eminenta E-verkisto, instruisto kaj organizanto, kiun ni planas prezenti al vi, karaj legantoj, en la sekva numero de “K”, ses jarojn de sia vivo pasigis kiel militkaptito en Siberio, kaj etoson de tiuj suferplenaj tempoj bone respegulas liaj siberiaj romanoj “La Viktimoj”, “La Verda Koro”, “Sur Sanga Tero”. Nian nunan rakonton ni finas per prezento de la fragmento el romano de J. Baghy “La Verda Koro”

Julio Baghy

La kurso



Lernoĉambro en siberia Popola Domo. Unu pordo, du fenestroj. La pordo estas malalta, la fenestroj estas mallargaj. En la lernoĉambro staras malnovaj mebloj: nigra tabulo, simpla tablo, unu seĝo kaj longaj benkoj. Sur la plafono estas elektra lampo. Ĝi ne estas bona. La plafono estas griza. La planko estas malpura. Sur la muroj estas instruaj bildoj. Ili montras objektojn, florojn, bestojn, homojn.

Sur la longaj flavaj benkoj sidas unu sinjoro (li estas poŝtofocisto), du soldatoj en rusa uniformo, tri soldatoj en uniformoj ĉeĥa, rumana kaj amerika, unu sinjorino, tri knabinoj en gimnazia uniformo kaj du knaboj. Ili rigardas la instruiston.

La instruisto estas soldato, sed ne en uniformo. Li estas hungaro kaj militkaptito. Li iras en la ĉambro, montras la bildojn, tuŝas la objektojn. Li instruas. La lernantoj kaj lernantinoj komprenas lin.

— Sinjorinoj kaj sinjoroj, ni parolas en Esperanto. Kio ĝi estas? Ĉu ĝi estas politiko? Ne! Ĉu ĝi estas religio? Ne! Ĝi estas kulturo. Ĉu vi komprenas?

La instruisto demandas. La lernantoj kaj lernantinoj respondas.

— Jes, ni komprenas.

— Ĉu vi ŝatas la kulturon, fraŭlino Smirnova?

— Mi ŝatas ĝin, sinjoro. Ni, rusoj, ŝatas la kulturon.

— Mi scias kaj gratulas.

— Mi dankas.

La instruisto demandas junan rusan soldaton.

— Kiu vi estas?

— Mi estas Janis Lekko.

— Ĉu vi estas ruso?

— Ne, mi estas latvo kaj rusa soldato. Ĉu vi ŝatas Esperanton?

— Jes, sinjoro.

— Mi dankas... Kaj vi, fraŭlino, kio vi estas?

— Mi estas gimnazia lernantino, sed mi ne estas rusa knabino. Mi estas polino.

— Ĉu la poloj ŝatas la kulturon?

— Ho, jes, sinjoro.

La instruisto iras en la ĉambro kaj li faras demandojn. La lernantoj kaj lernantinoj faras bonajn respondajn frazojn. Nur Iĉio Pang, la juna ĉino, faras interesan respondon.

— Mi estas malgranda ĉino kaj mi scias la kulturon.

— Knabo, la frazo estas malbona. Bona frazo estas: mi ŝatas la kulturon.

— Ne, sinjoro. La frazo estas bona. Mi scias, kio estas kulturo.


La sinjoroj kaj sinjorinoj rigardas la knabon. Ili ne komprenas lin.

— Kio estas kulturo? - la instruisto demandas.

— Ĉu vi ne scias, sinjoro? Kulturo estas homa kompreno. Mi ŝatas kaj lernas Esperanton. Ĝi estas homa kompreno: kulturo.

Sinjorinoj kaj sinjoroj. Esperanto estas homa kompreno. En la ĉambro sidas rusoj, ĉeĥo, polo, latvo, slovakoj, germanoj, ĉinoj kaj hungaroj. Ili estas homoj. Kiaj homoj ili estas? Modernaj homoj. La modernaj homoj ŝatas la kulturon kaj ili lernas Esperanton, lernas “homan komprenon”.

Regu la Amo sur la tuta Jero -



Naila Sadretdinova [TASKENTO, Uzbekistano]

(al la festo de Valentena tago)

skotoj. Junuloj antaŭtage eltenis el urno biletojn kun nomoj de junulinoj, kiuj iĝis sinjorinoj de liaj koroj por venonta jazo. Tio devigis al rilatoj, pri kiuj ni povas juĝi laŭ kavaltraj romanoj. Tial Valentena Jago estas festo intima kaj romantika. La angloj eĉ havas la popolkredaĵon, ke precipe la 14-an de februaro la naturo havas tuznon al Printempo. Jes, liziko de sentoj kaj liziko de naturo kreas harmonian kunfluiĝon kaj fajnan reciprokan penetron!

Fasis multaj epokoj, sed la festo vivas kaj ĝuste en tiu-ĉi tago ĉiuj geamatoj, geedzoj, geamikoj kaj najbazoj interŝanĝas per konfeso en la Amo kaj Amikeco. Ĉaz...

- ĉaz la Amo movas la Sunon kaj astrolumilojn

- pro la Amo oni lumigas la stelojn kaj pro ĝi kreskas floroj

- la Amo faras la printempon "eterna"

- Amo ludas per sortoj de homoj kaj civilizacioj

- pro la Amo pli forte batas la koroj

- pro la Amo okazas du ttionoj de geedziĝoj kaj duono de divorcoj kaj fariĝas sennombra kvanto de grandaj kaj malgrandaj ŝtenezaĵoj.

Amo estas diversa: ĝi estas pasia, platona, senresponda, la unua kaj la lasta, blukolora kaj rozkolora. Ĝi eĉ povas esti malica. Ofte oni prezentas ĝin kiel blinda, sed ĝi ne estas blinda - simple ĝi estas Amo!

Kaj ni ĉiuj estos vivaj! Malgraŭ militoj, avarkatastrofoj, ozonaĵ ttuoj, stresoj kaj nukleaj potencoj de superimpezioj - dume estas viva la Amo!

Ni alvokas vin ĉiujn rememori, ke vi estas amantaj kaj amataj, eĉ se al vi ŝajnas, ke tiuj sentoj restis malproksime en juneco; admizu Lunon, florojn, ŝalintan neĝon kaj belajn natuzaĵajn pejzaĝojn, diru unu al la alia vortojn de Amo!

Rafija Jafasova [EKATERINBURG, Ruslando]

La 14-an de februaro la tuta amoplena homaro festas tagon de la Sankta Valentino - protektanto de ĉiuj amantoj.

Historio de la apezo de tiu hela kaj gaja festo dum multaj jarcentoj interplektiĝis je diversaj legendoj kaj versioj... Jen la plej belaj el ili:

- Unu el la legendoj rakontas, ke la 14-an de februaro la antikvaj romanoj havis la feston de Luperkalĵ, kiam oni elektis fianĉojn kaj fianĉinojn kaj anoncis pri geŝianĉiĝo.

- Laŭ la alia legendo - Valentino estis pastro, kiu kaŝe, kontraŭleĝe sed laŭ sia korigimpeto geedzigis gvardianojn kun iliaj amatinoj kaj pro tio li estis ekzekutita. Sanktan Valentenon honoras Roma Katolika Eklezio.

- Laŭ la tria versio - dum la periodo de frua kristanismo (269 jaro) en la eterna urbo Romo lu juna kuracisto kaj predikisto estis kondamnita al morto. Antaŭ la ekzekuto li enamiĝis en blindan ŝilnon de sia karcergardisto. Kaj okazis miraklo: Valentino resanigis la junulinon. Antaŭ sia morto Valentino skribis al ŝi malgrandan letereton, modeste subskribis ĝin "via Valentino". Tiel aperis "valenten-leteretoj".

Ekzistas ankoraŭ unu versio, ke tiu festo devenas de paganaĵ tradicioj de la angloj kaj

venku malamon kaj la homsuferojn !

Ibnul Arabi (praa sofiano)
el la araba esperantigis **Hussein Amli**
[LONDONO, Anglio]

La religio de Amo

*Antaŭ hodiaŭ mi malkonfesis l'amikon,
Se lia kredo ne estas sama kiel la mia,
Mia koro tamen hodiaŭ fariĝis paŝtejo
por gazeloj kaj abatejo por monaĥoj,
Templo por idoloj, ka'bao por pilgriĝo,
Folio en la Biblio kaj paĝo en la Korano.
Mi havas nun nepre fidon ja je amo
kun kiu mi vojaĝis tien kien ĝia kanzavano gvidas
Ĉar amo estas nun mia nuzsola kredo!*



Naila Sadretulinova [TASHKENTO, Uzbekistano]



Jurij Kazakov
Esperantigis por KOMENCANTO
Jurij Perevalaov
[LESNOJ, Ruslando]

La sankta fraŭlino Amo

(fragmento)

*Kiom da fraŭlinoj en la aĝo de deksep
jaroj estas en la mondo! Sed vi scias nuz unu
el ili, nuz al ŝi vi rigardas en la okulojn,
vidas ilian brilon kaj profundon, kaj
malsekecon, nuz ŝia voĉo kortuŝas vin ĝis
larmoj, nuz ŝiajn manojn vi timas eĉ kisi.*

*Ŝi parolas kun vi, aŭskultas vin,
rigardas, silentas, kaj vi vidas, ke nuz vi estas
necesa al ŝi, ke nuz per vi ŝi vivas kaj poz vi,
ke ŝi amas nuz vin, same kiel vi - ŝin....*

Snejana Kononova,
[Nijnjaa OMKA, Ruslando]

Kononova

Bill Thorne
[LONDONO, Anglio]

Estu kuraĝa en la vilaĝo!

Ĉevalon kuracis sinjoro,
Li tute ne estis doktoro,
Kaj jen akcidento,
Li mem - paciento,
Pro granda "ĉevala" pilolo!



Esperantigis **Ginette Martin**
[SAULXURES/MOSELOTTE, Francio]

*Traduko el
"Vogezaj rakontoj"
Tiu rakontoj venas
de loka gazeto, kiu
rakontas pri vivo de
Vogezanoj antaŭ 50
jaraj. Vogezoj estas
montara regiono de
Orienta Francio. La
lando havas malriĉan
grundon. Tamen la loĝantoj ĉiam
elturniĝas por post-
vivi en malbonaj
cirkonstancoj.*



La vilaĝa buso

Hodiaŭ, ĉiu posedas aŭtomobilon, eĉ kelkfoje du. Sed, en la pasinta tempo, kiam oni devis iri malproksimen, tro foren por bicikli, ekzistis vilaĝa buso. Tiu buso ofte malfruis. Ĝi haltis apud domo de iu maljunulino, ĉar ŝi pensis marŝi. Ĝi haltis ĉe Leono, kiel interkonsentite, por preni tri anserojn en kesto kaj ligi ilin sur tegmenton, kun aliaj diversajoj. Kaj la ŝoforo ĉiam trovis pretekston por halti ĉe iu trinkejo: pneŭmatiko por unu, kontraŭinsekta pulvoro por alia, (restaĵo de la onklo kiu havis tro da ĝi), Tempo perdiĝis en diskutado, trinkado, la ŝoforo restis sufiĉe longtempe en la trinkejo; kaj estis tiel laŭlonge de la vojo.

Iun tagon, virino revenis per la vilaĝa buso kun malgranda infano. Ili revenis de vizito al kuracisto. Subite la infano kriegis pro malsato. La virino tuj malbutonas la bluzon kaj donas la mamon al la infano.

Alia infano en la buso neniam vidis tion

— Patrino, kion ŝi faras?

— Vi vidas, ŝi nutras sian infanon.

— Dio mia! Kaj li manĝos tion ĉi sen pano !!

(en tiu tempo estis peko manĝi sen pano. Por ke la bona manĝo pli longtempe daŭru, oni manĝis unu buŝprenon de la bona manĝo, unu buŝprenon de pano, k.t.p. La infanoj estis admonataj se ili ne obeis tiun regulon)

Kiel vi vidas, ĉiun semajnon okazis anekdoto en la vilaĝa buso, sed jen la plej bela:

Buso komencis ruliĝi sur la deklivo post halto. Ĉiuj ĝojis, post longa atendado.

Viro kuris malantaŭ la buso, kaj virino tra fenestro de la buso diris al li: "Ne utilas kuri, vi ne povos trafi ĝin!"

— Sed mi *devas* trafi, mi estas la ŝoforo !!!

Aforismo estas frato de anekdoto, amiko de paradokso kaj filo de saĝeco
{N.Neksin}

AFO[☹]RISMOJ[☺]

Kolektis kaj esperantigis
Hussein Amili
[LONDONO, Anglio]

La natura transiro de la homa menso ne estas de plezuro al plezuro, sed de espero al espero.

(Greka eldiraĵo)

Tranĉilo el la plej bona ŝtalo bezonas akrigilon, kaj la saĝulo bezonas konsilon

(Zoroastro)

Kiu ne tiras *sian pezon*, verŝajne forpuŝas *sian bonŝancon*

Sukceso estas neniam fina, malsukceso estas neniam fatala

Estas sufiĉo en la mondo por la homa bezono, sed ne por la homa avido

(Ghandi)

Mallongeco estas la animo de inaj subvestoj

Amo daŭras nur kiam la amantoj amas multajn aferojn kunkune, sed ne nur unu la alian

Estas bona esti grandioza, tamen estas pli bona resti humaneca

Kuraĝo estas tio, kio igas nin stariĝi kaj paroli; kuraĝo estas ankaŭ tio, kio ebligas al ni sidiĝi kaj aŭskulti

Naskiĝi kiel ĝentlemano estas incidento, morti kiel ĝentlemano estas atingo.

Esperantigis
Ginette Martin

[Saulxures/Moselotte, Francio]

Se oni volas vivteni, sufiĉas labori.

Se oni volas esti riĉa, oni devas trovi alian rimedon.


(Alphonse Karr)

Nia kapo estas ronda por ebligi, ke la penso ŝanĝu sian direkton

(Francis Picabia)

Iujn stultaĵojn mi faris, nur por havi plezuron rakonti ilin.

(Sacha Guitry)



Kolektis proverbojn kaj pentris
Yonier Cables Solis
[HOLGVIN, Kubo]

Proverboj

Al tiu ĉio cedas, kiu monon posedas

*Al*tan arbon batas la *bulmo*

Al venko rajto venas, se ĝin forto subtenas

Al peco pecon algluas, kiu neston konstzuas

*Al*mikeco apazte, afero apazte

*Al*tendis, meditis, ĝis en tombon englitis

Esperantigis **Lidija Burgar**
 [VOLGODONSK, Ruslando] (El la revuo "La kvantumo")

Teoremo pri la krokodilo

la teoremo: **La krokodilo estas pli longa ol larĝa**

la lemo 1: *La krokodilo estas pli longa, ol verda.*

la pruvo de lemo 1:

Ni rigardu al la krokodilo de supre: ĝi estas longa kaj verda. Poste ni rigardu al la krokodilo de malsupre: ĝi estas longa sed ne ĉiuloke verda (ĝi havas blankan ventraĉon), sekve la krokodilo estas pli longa ol verda. **La lemo esats pruvita.**

La lemo 2: *La krokodilo estas pli verda, ol larĝa.*


La pruvo de lemo 2:

Ni rigardu al la krokodilo de supre: ĝi estas verda kiel je longeco, tiel je larĝeco. Sed ĝi estas larĝa eĉ je larĝeco. La pruvo de aliaj vidpunktoj estas analogaj. **La lemo 2 estas pruvita.**

La pruvo de la teoremo:


Konforme al la lemo 1 la krokodilo estas pli longa, ol verda, sed al la lemo 2 — pli verda ol larĝa. Tiel la krokodilo estas pli longa ol larĝa. Kion necesis pruvi!

[Lemo — malpli grava teoremo, uzata en la pruvo de alia teoremo.]




[NOVOALTAJSK,
 Ruslando]
Nina Vinnikova

Pri bestoj, birdoj, herboj kaj cetera...

								
		besteto kun longaj oreloj	grasa hejma besto			birdo hejma kaj sovaĝa	likvaĵo de idioto	
insekto kun bunta belaj flugiloj	ne deziranta labori					nedefinita pronomo		
		tre tre granda						
	prepozicio	parazito sangosuckanta				sufikso		fakti
	sufikso kun junikio	orienta ludo		kion oni aidas	par' de edzin'	...erativo		
		likvaĵo por skribi						
		klaso de flugantaj bestetoj						
	herbo - floro japana E-revuo	produkto de kanzonisto						
						prepozicio		

Aleksandr Ĉernov [N.Salda, Ruslando]



Ginette Martin

[SAULXURES/MOSELLOTTE, Francio]

La sep aĝoj de la virina vivo

- bebo
- knabineto
- junulino
- juna virino
- juna virino
- juna virino
- juna virino

(la angla humuraĵo)

- Maria, helpu nin. Ni volas dividi 5 bonbonojn inter 6 personoj. Kion fari?
- Nul problemoj. — Mi rezignas pri mia bombono.
- Sed vi ne estas kalkulata en tiu disdono !!

Kirjakova Olga

[ORENBURGO, Ruslando]

Viro venas en la bibliotekon kaj diras:

- Donu al mi libron "Viro estas gvidanto de virino".
- Sinjoro, - respondas bibliotekistino, - la fantaziaĵoj situas en la najbara fako.

Kelkaj ŝercaj konsiloj okaze de la Valentena festo

Kiam la viroj konsentas je minimumo

Niaj amataj viroj ĉiam en ĉio preferas maksimumon: en la kvanto de virinoj, aŭtoj, en alkoholo, en manĝaĵoj... kaj nur en unu afero ili estas konsentaj je minimumo - en nia perforta reago. Konsiderante tion estas nemalbone memorfiksi kelkajn sufiĉe simplajn regulojn de virina parola etiketo

1. Kiel eblas malplimulte uzu pronomon *mi* en dialogoj same en monologoj kun viroj. Estas facile anstataŭigi ĝin per pronomo *vi*, ekzemple, nur vi, nur al vi, nur pri vi...

2. Forigu diversajn temperamentajn esprimojn, kiel: *mi ja petis vin, ĉu ne mi vin avertis, kiomfoje mi povas paroli...*


3. Ne menciu siajn proksimumojn, ekzemple: *kiel diras mia patrino, kiel opinias mia onklino*; anstataŭ tio tute taŭgas menciigi liajn proksimumojn: *kiel ĝuste diras via patrino, kiel vere opinias via amiko...*

4. Neniam komencu replikon de la dialogo per demandaj vortoj: *kial, kiu, kun kiu?* — ĉar la respondo vi jam scias, ekzemple: "*Kial vi ne telefonis?* - *Tial!*"; "*Kiu veturos kun vi oficevojaĝe?* - *Kamelo en ĉapelo*".

5. Neniam uzu verbojn en imperativo: *donu, aĉetu, donacu...* kaj tiel plu.

6. Kaj en ajna tempo kaj situacio, vi povas diri ĉion, kion via animo deziras, sed nur en formo de la vasta enanima dialogo.

kolektis, esperantigis kaj pentris



Naila Sadretdinova [Taŝkento, Uzbekio]

Anoncetoj Informoj Korespondu!

Ĉiu kadro kostas 10 rublojn por rusianoj aŭ 2 IRK por eksterlandanoj. Por abonantoj de 'KOMENCANTO' - senpage.

Nina Vinnikova
22 ja., instruistino, tutmonde
pri ĉiuj temoj
Depovskaja, 6-1
NOVOALTAJSK
Altajskij kraj,
658080
Ruslando

Aleksandr Šulepov
ŝatas danci, muzikon,
naturon...
Lenina, 2-2
VERHOTURJE
Sverdlovskaja reg.,
624380
Ruslando

Alina Mirgalimova
15-jara lernantino, ŝatas
amuzojn, dancojn,
vojaĝojn, sporton
60 let Oktjabrja, 6-135
NIŤNEVARTOVSK
628606
Ruslando

En nia E-Asocio multaj volas
korespondi kun esperantistoj el
diversaj landoj pri ĉiuj temoj kaj
interŝanĝi pm, pk, esp-ajojn.
P.O.Box 3
TANGSHAN, HeBei.
063000
Ĉinio

Tatiana Kossakowska
25 jara oficistino dez.
kor. tutmonde
Harcerska 13,
PL-44-200
RYBNIK
Pollando

Camile kaj Alexiane
12-jaraj francaj knabinoj dez.
kor. Kun gejunuloj tutmonde
Esperanto AFCE,
1 Allee de Kernisy,
FR-29000
QUIMPER
Francio

s-ino **Beata Hnidova**
turismo, organizo de tur-
ismo, korespondi tutmonde
Majakovského, 2111
CZ-734 01
KARVINA
Ĉeĥio

KOMENCANTO

gazeto por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj



Via abono por via kaj nia bono

Mohsen Valiyolahi
25 jara fraŭlo ŝatas
korespondi pri ĉiuj temoj
No 2, P.O.Box 69146
Janbe-Nahre-Ab
Shanzdah(16)-Metri Anghlab
Lane, Shahid Chamran str.,
BORUJERD,
Irano

Esperantistoj el Kongo
14-40 jaraj E-kursanoj serĉas
leteramikojn. Estas bonvenaj E-
libroj por biblioteko
The Black Bird's Institute
Jerry Mbemba (DKEA, Rue
Ngavula, 27, Kalamu [Yolo],
Kinshasa,
Respubliko Kongo

s-ino **Térèze Pinet**
68 ja, piedpromenado,
migrado, poŝtmarkoj,
reciprokaj vizitoj
5 rue de Banque
FR-75002
PARIS
Francio

Geamikoj! Ni savu la paper-forman version de *El Popola Ĉinio* !

Ekde 2001 jaro *El Popola Ĉinio* (EPĈ) aperos nur interrete, sed ne papere.

La vicprezidanto de UEA, *Renato Corsetti*, sendis alvokon al ĉiuj abonantoj kaj ŝatantoj de EPĈ, ke vi bonvolu skribi al la ĉina ambasado en via lando por esprimi vian bedaŭron kaj deziron plu ricevi la revuon ankaŭ en la nuna formo.

Li plu skribis: La letero estu pozitive vortumita, tio estas: ĝi emfazu la altan kvaliton de la revuo, ĝian utilecon por ekkoni Ĉinujon kaj ĉinajn problemojn kaj la ĝeneralan ŝaton de ĝi fare de la legantoj, ktp. Fine de la letero oni esprimu la deziron, ke la kompetenta registara instanco reripensu la decidon kaj ebligu pluan aperon de la papera versio de *El Popola Ĉinio*.

KOMENCANTO - 2001

Dankon pro via abono !

